

Hilelismo kaj Homaranismo

Certe vi ĉiuj - karaj aŭskultantoj - scias ion pri la kreinto de Esperanto, sed supozante ke ne ĉiuj konas ĉiujn detalojn, mi volas paroli pri hilelismo kaj homaranismo. Pli ekzakte mi resumos artikolon de Christer Kiselman (Eksprezidanto de la Akademio de Esperanto), publikigitan en 2010 en la broŝuro "Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono".

La titolo de la artikolo estas "La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj". La aŭtoro baziĝis sur pluraj tekstoj de Zamenhof: manuskriptoj, libroj, artikoloj kaj multaj leteroj.

Evidente mi povas fari nur mallongan resumon, limiĝante al la esenco.

Estas sciite, ke Zamenhof estis judo. Li afliktiĝis pri la sorto de la judoj (kiuj "travivis en fremda medio dum jarmiloj" kaj estis ofte persekutitaj). Li pripensis, kiel helpi la popolon, al kiu li apartenis.

"Popolo estas – ĝenerale dirite – difinita per sia lingvo, sed la judoj ne havas komunan lingvon." Multaj judoj parolis la jidan, sed ĝi estis geografie limigita. Do la "religio estas la sola elemento kiu donas al la judoj identecon, sed ĝi ne sufiĉas. Ankaŭ la lingvo jida ne sufiĉas, ĉar ĝi estas tro malforta." Dum kelka tempo Zamenhof aliĝis al cionismo, sed poste li konsideris ĝin utopio kaj atentigis pri la problemoj de tiu movado.

Pro ĉio tio Zamenhof alvenis al la ideo de hilelismo. En 1901 li publikigis la ruslingvan libreton *Hilelismo. Projekto pri solvo de la hebrea demando*". (Zamenhof uzis ofte la vorton "hebrea" anstataŭ "juda".)

Kiselman citas la esencon de la projekto:

1. Purigi la hebreaŭ religion por ke ĝi ĉesu esti por ni eterna malhelpaĵo en ĉio [...].
2. Krei por la hebreaŭj propran lingvon [...].
3. Elekti ian difinitan lokon, kie povus komenci koncentriĝi ĉiuj tiuj hebreaŭj, kiuj pro io decidiĝas elmigri el sia natura patrujo kaj volus vivi inter la siaj.

Kiel oni vidas en la dua frazo, Zamenhof sugestis la kreadon de specifa lingvo por la judoj; li ne pensis uzi Esperanton, kvankam li jam estis kreinta ĝin.

Rilate al la religiaj ideoj, hilelismo asertas:

- "1. Ni sentas kaj rekonas ekziston de la plej alta Forto, reganta la mondon, kaj tiun ĉi Forton ni nomas Dio.
2. Siajn leĝojn Dio enmetis en la koron de ĉiu homo en formo de konscienco; tial vi ĉiam obeu la voĉon de via konscienco, ĉar tio ĉi estas neniam eksilentanta voĉo de Dio.

3. Esenco de ĉiuj leĝoj, donitaj al ni de Dio, esprimas sin per la formulo: 'agu kun aliaj tiel, kiel vi volus, ke aliaj agu kun vi [....]."

Tiaj ideoj certe estus akcepteblaj por multaj homoj, ne nur judoj.

En "1906 Zamenhof publikigis anonime [...] artikolon nomitan *Dogmoj de Hilelismo*" kaj li asertis tion: "La hilelistoj esperas, ke per konstanta reciproka komunikigado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon [...]."

En la sama jaro Zamenhof publikigis en la rusa kaj en Esperanto la broŝuron *Homaranismo*, kies enhavo estas tre simila al la ideoj de hilelismo. Zamenhof eksplikas: "La ideo de homaranismo naskiĝis de la antaŭe ekzistinta ideo de 'hilelismo', de kiu ĝi distingiĝas nur per tio, ke la hilelismo koncernis nur unu homan grupon, dum la homaranismo koncernas ĉiujn popolojn kaj religiojn."

Alia grava aserto estas: "La homaranismo estas celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco."

Koncerne al lingvo Zamenhof diris: "Ĉar en la nuna tempo ekzistas nur unu neŭtrala lingvo, nome Esperanto, tial la homaranoj akceptas ĝuste ĝin; tamen ili rezervas al si la rajton anstataŭigi iam poste tiun ĉi lingvon per alia lingvo, se tio montriĝos utila."

Do, la kreinto de Esperanto ne volis altrudi sian lingvon; li imagis, ke alia lingvo povos esti uzata – "se tio montriĝos utila".

En la konkludo de sia artikolo Kiselman konstatas: "...ni povis vidi ŝanĝojn en la pensado de Zamenhof rilate al la juda demando, rilate al la rolo de lingvo kaj rilate al la religio."

Pliaj detaloj pri homaranismo estas legeblaj en la esperanta Vikipedio. Ankaŭ la artikolo de Kiselman estas alirebla en la interreto.